# BULTENO
# DE ESPERANTISTA KLUBO
# EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA 2-a numero aprilo-junio 1971

Grava atentigo ! Notu bone ! Grava atentigo ! Notu bone !

NOVA KLUBA KUNVENEJO DE LA 1-a DE JUNIO : VÁCL. NÁMĚSTÍ

La kluba estraro sukcesis kun dankinda helpo de s-anino J. Míčová, akiri novan kunvenejon, denove en la urbocentro: en Závodní klub Strojexport, Praha 1, Václavské náměstí 56 (palaco Fénix). La enirejo : en la tradoma pasejo kondukanta al la kinejo Blaník.

La programoj en la nova kunvenejo estos komencitaj 1. 6. (mardon) per parolado de s-ino A. L. Ahlrén el Svedio pri "Stokholmo en nova vesto" (kun koloraj diapozitivoj). La 8an de junio estos aranĝita a r t a v e s p e r o de s-ano Mir. Smyčka, membro de la Operdomo en Ústi nad Labem.

Venu amase !

La tempo de la kunvenoj restas : ĉiun mardon 19-21 horo.

MARĜENE DE LA 50-a DATREVENO DE KPĈ

Estas malsanoj, kiujn oni devas operacii. Sed kiom da pacientoj la operacion prokrastas kaj lasas sin kuraci per ŝmiraĵoj kaj piloloj. Kaj pluraj kuracistoj vivtenas sin nur preskribante la medikamentojn.

Kapitalisma socio estas ankaŭ malsana kaj multaj konsideras socialismom aŭ komunismon kiel idealan solvon. Alia demando estas kiamaniere atingi ĝin. Ĉu helpo de medikamentoj aŭ per kirurgia tranĉilo. En la socia medicino regas ĝis nun ignoro, nescio kaj malkuraĝo. Diversaj sorĉistoj, ŝmiraĵistoj kaj ĉarlatanoj prokrastas ian ajn radikalan solvon ĝis tempo "venonta".

Realigo de socialismo estas tasko treege malfacila. Anstataŭigi privatan posedon de produktorimedoj per la tutpopola signifas organizi en la socio tiom da fortoj, ke oni povu tiun ĉi ŝanĝon efektivigi. Nuraj konsento kaj proklamoj ne sufiĉas. En la kapitalisma sociordo grupo de posedantoj disponas pri grandegaj ekonomiaj rimedoj kaj pere de ili ĝi povas alpropriigi al si ĉiujn materiajn aŭ kulturajn valorojn de la tuta socio. Kapitalisma superproduktado unuflanke alportas ĉiam pli grandan profiton al la reganta klaso kaj aliflanke naskas mizeron kaj malriĉecon de la ekspluatataj amasoj. Fari decidan paŝon al socialismo signifas antaŭ ĉio organizi fortojn kontraŭ posedantoj de la produktorimedoj.

Tiun ĉi paŝon entreprenis antaŭ kvindek jaroj – laŭ la modelo de la sovetiaj komunistoj – avangardo de la ĉs. laborista klaso, fondinte Komunistan Partion de Ĉeĥoslovakio. Tiamaniere ankaŭ ĉe ni komenciĝis klopodoj kuráci la socion sen "ŝmiraĵoj" kaj "piloloj" de reformistoj, oportunistoj k. a. Ilin anstaŭis klara teorio marksisma-leninisma kaj praktikaj agoj, kiuj rezultis el ĝi. En la relative mallonga tempo post la forigo de iamaj posedantoj nia socio multe progresis en la konstruado de socialismo. Ke la vojo, kvankam ne glata, gvidas nin al la celo, tion pruvas bilanco de la forpasintaj jardekoj.

Por ni, esperantistoj, kiuj ankaŭ volas realigi socialismon kaj tiel evoluigi nian socion, estas grave konsciigi pri kelke da fundamentaj instruoj.

1/ Pri la socia neceso de nia celo

2/ Trovi en la socio niajn aliancanojn kaj distingi ilin de la kontraŭloj (t. e. "ŝmiraĵistoj")

3/ Helpi al la socio. Kontraŭstari izolitecon, sektecon. Ne eblas servi al ĉiuj, eĉ se temas pri universalaj honaj celoj.

4/ Organizi sin. Labori discipline, unuece kaj laŭplane por la movado. (En KP komunisto, kiu neglektas statuton de la partio ne rajtas esti ĝia membro.)

5/ Enkonduko de la internacia lingvo eblas nur per politikaj rimedoj. Pro tio ni devas sekvi politikon kaj influi ĝin favore al niaj celoj. Regi la lingvon.

6/ Niaj vortoj identu kun niaj faroj. Teorio sen konsekvenca praktikado estas nura idealista parolado.

7/ Lingva analfabetismo malhelpas krei internacian socion. Pri la ekzisto de la moderna nacio multon meritis ankaŭ ĝenerala disvastigo de la baza klerigo, t. e. scipovo legi kaj skribi. Por la socialisma komunumo ĝi estas des pli grava. La situacio, kiam ĉiu povos paroli kun ĉiu ebligos likvidi ŝovinismon kaj naciismon.

8/ Divido de laboro estas ĉefa integra faktoro de la internaciismo. Eŭropa oleo- kaj gaskondukilo kunigas la kontinenton pli forte ol multjara propagando por la unueco de ties ŝtatoj. Tial necesas doni ankaŭ al ĉiu parto de la socio ĝustan lokon kaj gravecon. Aprezi sed ne superaprezi la rolon de la internacia lingvo en la evoluo de la socio.

Josef D r l í k

NOVA INSIGNO DE EK PRAHA

Apuda desegnaĵo montras la novan insignon, kiun laŭ la projekto de FABA eldonos por siaj membroj la Esperantista klubo en Praha. La insigno estos baldaŭ aĉetebla en tri diversaj kolorvariantoj. Ni atentigas precipe ĉiujn kolektantogn de insignoj, ke ili rapide aĉetu ĝin ne nur por si mem, sed ankaŭ por siaj en- kaj eksterlandaj geamikoj kiel belan memoraĵon pri nia klubo.




## ĜENERALA KUNVENO DE EKP

Esperantista Klubo en Praha, loka grupo de Ĉeĥa Esperanto Asocio, okazigis la 15-an de marto 1971 sian plenkunsidon, kiun ĉeestis 78 membroj kaj du eksterlandaj gastoj.

Malfermis ĝin la prezidanto de la klubo, prof. d-ro Rudolf Horský bonveniginte la partoprenantojn.

Per du minutoj da silento oni honormemorigis neforgeseblan s-inon Julie Šupichová kaj antaŭnelonge forpasintan prof. d-ron František Jermář.

Sekvis raporto pri aktiveco de la klubo dum la pasinta periodo. /Ni publikigas ĝin sur la alia loko/.

Post la propono de balotkomisiono kaj balotado la kunsido elektis novan komitaton de EK Praha kun prezidanto d-ro Rud. Horský, vicprezidantoj A. Slanina kaj A. Bartošík kaj sekretariino L. Klegová. Aliaj komitatanoj estas: A. Bárochová /kasistino/, A. Zmeškal /bibliotekisto/ kun anst. ing. H. Landsperský, B. Dryák /mastro/, L. Kynčl /programoj/, M. Josková /ekskursoj/, inĝ. J. Felix, J. Mařík, O. Khíchal /gazetaro/, I. Rubíková. kaj C. Řádková /reprezentantoj de la junularo/, ark. J. Drlík, Jar. Tomčík, J. Šperling /majordomoj/ kaj V. Lorenz.

La revizian komisionon konsistigas: O. Hankeová, M. Šmidrkalová, anstataŭantino S. Žirovnická.

En sia referaĵo la prezidanto d-ro R. Horský raportis pri la pasintjara agado de EK. Oni aranĝis kunvenon honore al la 300-a datreveno de la morto de J. A. Komenio. Sukcesa estis plue eldono de la broŝuro "Cesta do Španěl" de d-ro R. Horský. Grava estas ankaŭ ŝanĝo de la statuto de la klubo. De 21. 1. 1971 jam funkcias "Klubo de Esperantistoj en Praha" kiel loka grupo de Ĉeĥa Esperanta Asocio, kun jura subjektiveco. Ĝojiga estas fakto, ke la nombro de la klubanoj proksimiĝis jam al 420. La cirkulero de EK "Zprávy" nun sub la nova titolo Bulteno de Esperantista Klubo en Praha aperis kvarfoje dum la pasinta jaro.

Krome ankaŭ la kluba biblioteko denove servas al la legantoj. Dank' al s-ino Šustrová kaj

s-ro Zmeškal kaj iliaj helpantoj ĝi estas denove malfermita ĉiumerkrede de la 18-a ĝis la 20-a horo kaj ĉiusabate antaŭtagmeze inter 9-11-a horo. Eĉ eksterprahanoj havas eblecon perpoŝte prunteprenadi Esperantajn publikaĵojn.

Pri la lingvonivelo de la klubanoj zorgas dum regulaj dekminutaj programoj eterne pacienca kaj oferema a-ano A. Slanina. Pri amuzaj kaj kvalitaj programoj senĉese zorgas s-ano D. Bartošík. Sen lia longjara sperto la aranĝoj stagnus. Helpis lin ankaŭ multaj geklubanoj, ekzemple ing. E. Felix, Eli Urbanová, J. Ondráček, s-ino Bendová, L. Kynčl, J. Nevan kaj aparte s-roj J. Tomčík kun sia alt-nivela prelego pri Th. Čejka kaj J. Mařík, kiu rememoris aŭtoron de la I-a Esperanta lernolibro F. VI. Lorenz. La Zamenhofa vespero jam tradicie aranĝita kun alparolo de d-ro R. Horský kaj riĉigita per kantoj kaj kultura programo honorigis la kreinton de la internacia 1ingvo.

Sed ne nur inter la "muroj" de Praha aktivis niaj esperantistoj. S-inoj Josková kaj Čečelínová aranĝis ekskursojn al Mělník, Koněpruské jeskyně /Grotoj de Koněprusy/. Vintre kelkaj ĝuis restadon en Malaltaj Tatroj dum la "Internacia skisemajno".

Nek politikan flankon oni povas neglekti. Arĥitekto J. Drlík, T. Balda, inĝ. F. Sviták kaj s-ino Juřenová rememoris ĉiujn gravajn politikajn kaj naciajn datrevenojn. Mi devas ankaŭ rememori interesajn prelegojn de J. Mařík kaj inĝ. F. Sviták pri la tutmonda E-movado, kunlaboro kun UEA ktp. Interese raportis pri sia vojaĝo al Japanio kaj renkontiĝoj kun la japanaj esperantistoj redaktoro O. Kníchal. S-ano B. Dryák nelacigeble zorgis pri amuza flanko de la programoj – per kvizoj, diapozitivoj, kaj ĉefe pri subskriba sinprezento.

Estas ĝojo, ke ankaŭ nia junularo sub la gvido de O. Šádková reviviĝas. Nia "Esperanta estonteco" meritas, ke ni pli kaj pli helpu ĝin. Subtenante la junularon ni ege helpas al la movado.

Agrablajn surprizojn al la klubo daŭre alportas vizitoj de eksterlandaj geesperantistoj. Iliaj prelegoj aŭ salutparoladoj efikas kiel injektoj – por la t. n. "eternaj komencantoj", kiuj nekomprenante penas pli rapide lerni Esperanton.

La plej varman dankon por ĉiutaga, laciga, sed necesega laboro por nia klubo ni dediĉu al nia eterne juna, vigla kaj por Esperanto ĉiondonanta, ŝatata s-ino Anna Bárochová. Esperanto kaj ŝi estas unu sama afero; sen ŝi ni ne povas imagi nian pluan agadon.

L. K.

## <u>POKLADNÍ ZPRÁVA</u>

Díky všem, kteří včas pochopili svou povinnost a zaplatili již členský příspěvek na letošní rok 1971. Jak známo, Klub esperantistů se stal místní skupinou svazu a je tudíž povinností každého člena klubu zaplatit nejen klubovní, ale i svazový členský příspěvek.

<u>Příspěvky na rok 1971</u>:

za členství v ČES a v jeho místní skupině Klubu esperantistů v Praze s odběrem svazového časopisu STARTO a klubového věstníku BULTENO /a v případě, že příspěvek bude zaplacen mezi prvními 1100 členy svazu, s kolektivním členstvím v UEA/, platí

- výdělečně činní — Kčs 68, -
- důchodci — Kčs 44, -
- studující — Kčs 34, -

Nově přihlášení členové platí jednorázové zápisné + 10, - Kčs.

Rodinní příslušníci a příznivci se stávají členy svazu a klubu – bez odběru časopisu a nároku na kolektivní členství v UEA – za roční příspěvek 20, - Kčs; dosud nepřihlášení do svazu platí navíc 10, - Kčs zápisného.

Naše výzva v pokladní zprávě v minulém čísle zpravodaje se setkala s patřičnou odezvou a tak již do konce března jsme mohli odvést svazu členské příspěvky za 215 přihlášených, tedy více než za polovinu z dosud zaregistrovaných členů klubu. Doufáme, že i ostatní co nejdříve své příspěvky zaplatí a vyrovnají tak dluh svazu.

A. Bárochová pokladní

## Persone

La 29an de majo sesdekjariĝis la prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, prezidanto de Ĉs. Esperanto-Federacio kaj komitatáno de UEA, longjara membro de nia klubo kaj la redaktoro de 50 numeroj de nia kluba Bulteno (1953-58), Esp. instruanto en Someraj kolegioj kaj tendaroj Josef Vítek en Mělník. Okaze de lia vivojubileo ni deziras al li plenan sanon kaj prosperon en la laboro por la sukceso de la internacia lingvo.

ooooo

Jiří Král, membro de Klubo de Esperantistoj en Praha, mortis la 6an de aprilo en la ago de 49 j.

ooooo

Ing. Zdeněk Čapek edziĝis la 18an de februaro en Praha.

ooooo

## Nia klubo en nombroj

/Statistiko pri la jaro 1970 laŭ la kluba libro de ĉeestantoj/

En la jaro 1970 la Esperantista Klubo en Praha okazigis 51 regulajn ĉiulundajn kunvenojn en la Řeznická-strato (unu fojon ne okazis kunveno – pro la Paska lundo).

En la 1-a duonjaro ĉeestis la 25 kunvenojn 1335 membroj kaj 162 gastoj, sume 1497. El la gastoj 13 eksterlandanoj el 8 landoj, 61 de ekster Praha (en tio karavano de 34 Melník-annoj) kaj 78 el Praha.

En la 2-a duonjaro la numeroj estis: 26 kunvenoj, ĉeestis 1430 memboj kaj 215 gastoj, sume 1645 . El la gastoj: 78 eksterlandano j el 14 pluaj landoj, 52 el ĈSSR de ekster Praha kaj 87 el Praha.

En la tuta jaroj: 51 kunvenoj, 2765 membroj, 377 gastoj, sume 3l42 homoj. El la gastoj estis 91 eksterlandanoj el sume 22 landoj, 113 el ČSSR de ekster Praha, el tio 5 e1 Slovakio, kaj 173 el Praha.

Do, la tuta sumo de personoj, kiuj vizitis en 1970 nian klubejon en Řeznická kaj subskribis sin en la kluba libro, estas 3142 personoj (krom tio certe estis negranda nombro da nesubskribintoj).

La 91 alilandanoj, alvenintaj dum la jaro, estis el 22 landoj de 4 kontineňtoj (Eŭropo, Azio, Afriko kaj Aŭstralio). Sinsekvo de la landoj laŭ la kvanto: FRG (17-membra mezlernejana grupo), Svedl. 11, Francio 8, Nederl. 7, Pollando 7, po 5 el Hungario, Svisl., Aŭstrio; el Okc. Berlino 4, Jugosl. 4, Rumanio 3, po 2 el GDR, Hispanio, Israelo, Alĝerio, po 1 el Estona SSR, Belgio, Japanio, Aŭstralio, Bulgario, Italio kaj Danlando.

Se ni volas ĵeti la rigardon, kiel la membroj de la klubo plenumas – meznombre – sian rajton (kaj plie devon!) vizitadi la klubajn kunvenojn, ni povas konstati: ĉiun el la 51 kunvenoj ĉeestis meznombre 54, 23 klubanoj, t. e. ĉ. 16 % el la 366 membroj pagintaj sian kotizon en 1970.

Restas la demando: ĉu la procento estas sufiĉe alta, aŭ pripensinde malalta?? La klub-estraro certe akcentus la duan tezon. Kaj la kluba popolo? Ĝi povus oponi: en la citita procento respeguligas la altirforto de la klubaj programoj: Jen dilemo, ĉu? Sed la "popolo" devas noti, ke ĝi mem grandparte kreas kaj prezentas la programojn!

Interese estas ankaŭ vidi la ŝanĝiĝemon de la nombroj laŭ la sezonoj: la kunveno kun la plej alta ĉeestant-nombro: 16.3. Jozefa vespero (140 homoj, el tio l4 el Mělník); kun la minimuma ĉeestataro: 5.1. (33 membroj kaj 4 gastoj). La monatoj kun la plej granda ĉeesto: novembro (355 plus 28, sume 383), junio (261 plus 27, sume 288), decembro: (252 plus 30, sume 282). Kun la plej malgranda ĉeesto: januaro (183 plus 13, sume 196), julio (178 plus 42, sume 220), majo (201 plus 21, sumě 222). Julio registris la plej grandan foreston de membroj: ĉeestis sole 178. La ceteraj monatoj altiris: febr. 210 plus 16 /226/, marto 245 plus 58 /303/, aŭgusto 212 plus 55 /267/, sept. 210 plus 30 /240/, okt. 223 plus 30 /253/

Mi kredas, ke nombroj ne nur povar esti interesaj, sed estas utilaj por plua laboro kaj ĝia planado. Pro tio kaj por tio mi faris tiun ĉi (cetere temporaban!) statistikon.

/15-5-71/ J. Mařík.

PROGRAMOJ D E LA KLUBAJ VESPEROJ !

majo – aŭgusto

| | | |
|---|---|---|
| 4.5. | Inĝ. P. Sviták | Kion donas ĈEA al esperantistoj |
| 11.5. | Ant. Slanina | Filma vespero (Esp. Kolegio Doksy kaj raraj groteskoj). |
| 18.5. | J. Ondráček | Elektitaj paroladoj de I. Lapena, IIIa p. |
| 25.5. | Arĥ. J. Drlík | 50 jaroj de KPĈ |
| | PhMr Plananská | La banloko Konstantinovy Lázně |

junio
(Václavské nám. !)

| | | |
|---|---|---|
| 1.6. | Anna L. Ahlrén (Svedl.) | Stokholmo en nova vesto (kun koloraj diapozitivoj) |
| 8.6. | M. Smyčka, membro de la Operdomo Ústí n. L. | Arta vespero |
| | (Aktualaĵo): | 70 jaroj de Esp. Klubo Brno |
| 15.6. | Musilová – Dryák | "Duelo kun la memorkapablo", II (kvizo) |
| 22.6. | D-ro R. Horský | Ĉu vi konas eŭropajn urbojn? (kvizo kun lumbildoj) |
| 29.6. | J. Ondráček | Elektitaj paroladoj de I. Lapena, IVa p. |

julio
rezervita por eksterlandanoj

aŭgusto

| | | |
|---|---|---|
| 3.8. | – | 50-a datreveno de la XIII-a Universala kongreso de Esperanto en Praha (31. 7. - 6. 8. 1921) |
| | M. Hansen (Svedl.) | Rememoroj pri SET Lanĉov |
| 10.8. | D-ro R. Horský | rezervita |
| 17.8. | Inĝ. E. Felix | Interhomaj rilatoj (II-a parto) |
| 24.8. | kolektive | Nia vojaĝo tra Hungario, Rumanio kaj Bulgario |
| 31.8. | J. Tomčík | El la historio de Esperanto |

-X-X-X-X-X-X

Jubileoj kaj datrevenoj en la III-a jarkvarono:

30.6. fariĝos 80-jara malnova amiko de nia klubo kaj senlaca aganto por la Internacia lingvo dum longaj jardekoj, s-ano Frant. Pytloun en Poděbrady.

19.7. ĝisvivos siajn 75 jarojn nia estinta longjara membro kaj aktivulo, elstara funkciulo de nia landa movado, sinjoro Ota G i n z.

Al ambaŭ jubileantoj ni anticipe deziras bonan sanon por la plua vivo kaj eblecon de ĝojodona aktiveco!

mmmmmmmmmmmmmm

30.7. pasos 15 jaroj de la morto de D-ro Stanislav Kamaryt, unu el la plej elstaraj personoj de la ĉeĥoslovaka E-movado, aktivulo de nia klubo jam en la unuaj jaroj de ĝia ekzisto.

Ni antaŭinvitas vin al pilgrimo al lia tombo en Praha-Holešovice, kiun partoprenos reprezentantoj de nia klubo kaj ĈEA. (Preciza dato difinota).

mmmmmmmmm

31. 7. – 6. 8. pasos 50 jaroj de la okazigo de la unua Universala Kongreso de Esperanto en ĈSSR, "La XIII-a". Ni serĉas en Praha la personajn partoprenintojn de la XIII-a kaj petas ilin anonci sin al ni. Ĝis nun ni scias pri s-rino A. Hejnová, s-ino Sklenčkavá. Ni tre ŝatus aŭdi iliajn personajn rememorojn pri la Kongreso, la lastan mardon en julio!!!

mmmmmmm

K l u b a  e k s k u r s o

46 niaj klubanoj partoprenis, dimanĉon la 3-an de majo, turisman ekskurson per luita aŭtobuso al interesaj lokoj ĉirkaŭ Praha (kastelo en Roztoky, Levý Hradec, Kastelo Okoř, rotundoj en Budec kaj en Holubic, Zskolany, Brandýsek). Ili revenis kontentaj pri la aranĝo.

(Laŭ J-a).

La lasta sciigo – La lasta sciigo – La lasta sciigo – La lasta sciigo

RENKONTIĜO KUN LA PREZIDANTO DE VPEA

S-ano Nguyen van Kinh, prezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio kaj partoprenanto de la XIV-a Kongreso de KPĈ en Praha, akceptis la 27-an de majo delegitaron de la ĉeĥa Esperanta Asocio kaj ĉs. MEM-sekcio, kiujn reprezentis s-anoj arĥ. J. Drlík, T. Balda, J. Mařík, O. Kníchal, J. Tomčík kaj inĝ. E. Sviták.

/ K /

ĈU KUNIKLO-BREDISTOJ AŬ ESPERANTISTOJ?

Jam kelke da jaroj ĝojigis nin en tradiciaj Jozefaj vesperoj la Esperanta junularo de la urbo Mělník. Ili venadis kun sia instruisto Jozefo Vítek, multaj eĉ kun siaj gepatroj, kaj ĉiuj – ambaŭ generacioj – kontribuadis per iu ereto al la pure Esperanta programo. Estis ĉarma imago, kiel la internacia ideo progresus, se la loka grupo en ĉiu urbo laborus tiel vigle kaj modele kiel en Mělník.

Ĉi-jare oni interkonsentis interŝanĝi la rolojn: la praga junularo prezentos la programon, ĉi-foje "aprilan", kaj la Mělníkanoj amuziĝos.

Ĉeestis pli ol 130 geesperantistoj. Sed ho ve, kiamaniere recenzi ĉi tim vesperon kaj konservi optimisman humoron? La junularo en Prago post la foriro de Nikolao Nevan kvazaŭ estus perdinta sian risorton – kaj estus kuraĝa eŭfemismo diri, ke ĝi stagnas. Verdire, malgraŭ la ĉiujare plenŝtopitaj komencantaj kursoj, la aktiva junularo sukcesis ŝrunpi jam al nura j u n u l a r o , nome Johano Nevan kaj Olnjo Šádková. Tiuj du prezentis ĝin per bone elektita kaj bele deklamita poemo kaj humura konversacio. Sed la resto de la programo, spite al sindona klopodo de s-ano Slanina, sukcese sekretigis, ke temas pri entrepreno de esperantistoj. Neinformita fremdulo estus verŝajne konjektinta, ke li troviĝas inter kuniklo-bredistoj aŭ kolektantoj de fromaĝskatoletoj, sed neniel li estus diveninta, ke temas pri realigantoj de la nobla ideo de J. A. Komenio.

Iu hazarde veninta gasto el Nederlando finiĝis la vesperon per perfekta Esperanta alparolo, en kiu li esprimis sian envion pri la bela kaj plenŝtopita kunvenejo, kaj bedaŭris mirante, ke el la tuta programo li komprenis nur la komenceton.

Kian konkludon ni tiru el tiu ĉi malĝoja sperto?

Supozeble en ĉiu klubo ekzistas du partioj: unu de tiuj, kiuj volas praktiki la lingvon, kaj la dua de tiuj, kiuj tie volas amuziĝi kaj nur amuziĝi sen iu ajn peno. Kiel solvi tiun ĉi dileman? Nia liberema karaktero sufloras: ni lasu ĉiun paroli laŭ sia gusto, nacilingve aŭ Esperante, kaj anstataŭ Klubo de Esperantistoj ni nomu nin Klubo de Krokodiloj.

Sed ne kredu, ke tiu ĉi stato estus daŭra. La facileco paroli la gepatran lingvon, kiun mi konas, kaj la malfacileco paroli la Internacian lingvan, kiun mi n e  r e g a s , baldaŭ postulus novan ŝangon de la kluba nomo: Klubo de sencelaj ĉeĥaj babilantoj. Ĉar rigardu societon de dek esperantistoj, kiujn altabligas unu ĉeĥe parolanta persono: post kvin minutoj ĉiuj parolas ĉeĥe. Se vi ne kredas, faru tiun eksperimenton mem.

Nun verŝajne iu prezentos la kutiman demandon: "Kial paroli internacie, se ĉe la tablo sidas neniu alilandano?" Estas jam enue respondi tiun ĉi demandan. Sed tamen ĝi ne restu nerespondita.

Neniu homo povas ellerni ian ajn lingvon nur en lernejo aŭ kurso. Tie oni povas ellerni nur la gramatikon kaj kelke da vortoj. Sed al 100 horoj en la kurso apartenas neeviteble 1000 horoj de praktika uzo, por ke oni la scion el la kurso aktivigu kaj igu daŭra. Sendu studenton, kiu sukcese pasis sian maturekzamenon post 6-jara studo de la angla, al Britujo. Komence li estos tute perdita,

kaj ankoraŭ post 4 jaroj oni tuj ekkonos en li fremdulon. Tamen se li havos tie ĉeĥan societon, oni tion ekkonos ankoraŭ post 50 jaroj.

Do, por perfektiĝi en iu ajn lingvo, oni devas ĝin praktike paroli. Sed kiu ne regas la lingvon, ne ŝatas ĝin paroli. Se oni cedas al tiu malŝato, oni neniam perfektiĝos. Jen la fermita cirklo, kiun oni neniel povas enpenetri krom per venko super la propraj pigreco kaj komfortemo.

Felix

Antaŭ 50 jaroj - La XIII-a en Praha

50 jaroj pasos post nelonge de la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto; la unua kaj ĝis nun la lasta, kiu okazis en nia lando (31.7. – 6.8.1921). Ĝi estas grava jubileo antaŭ ni. Ni rememoru la gravan okazintaĵon de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado per resuma, sed trafa priskribo de la unika atmosfero fare de D-ro Edmond Privat:

La Praha kongreso estis grandioza manifestacio de la progresoj de Esperanto dum la antaŭmilita jaro. Pli ol du mil adeptoj alvenis el 35 landoj[x]). Dek registaroj sendis reprezentantojn (belga, finna, hispana, itala, nederlanda, litova, saksa, ukraina, jugoslava, ĉeĥoslovaka). La Ligo de Nacioj delegis sian vicsekretarion ĝeneralan d-ron Inazo Nitobe, eksrektoron de la universitato en Tokio. La Internacia Laboroficejo sendis s-ron Blumel kaj la Ruĝa Kruco s-ron Horner. La ĉeĥoslovaka ministro de instruado mem malfermis la kongreson kaj la eksterlanda ministro partoprenis komitatan vespermanĝon de UEA kun la oficialaj reprezentantoj.

La tuta Mezeŭropo tiun ĉi fojon aŭdis pri Esperanto dum la somero; ĉar vojaĝis ne nur la kongresanoj, sed iliaj familianoj kaj miloj da ceteraj partoprenantoj ĉe antaŭfestoj aŭ postaj kunvenoj en Berlin, Dresden, Wien, Budapest, Graz, Trento, Reichenberg. Urbojn kaj staciojn trapasis dekoj da internaciaj karavanoj parolante Esperanton. Neniam antaŭe la sono de la lingvo tiom aŭdiĝis en stratoj, en stacidomoj, en vagonoj. Ĉie pendis flagoj, ĉie brilis steletoj. Ĉe la landlimoj sindone deĵoris UEA-delegitoj kun verda brakrubando. Eĉ fervojistoj respondis en Esperanto.

En multaj vilaĝoj ĉeĥoslovakaj, hungaraj, aŭstriaj amasiĝis lokaj anaroj por bonvenigi eksterlandanojn. Sub somera suno flamis ruĝaj ŝaloj de kamparaninoj flue babilantaj en lingvo Zamenhofa. Oni demandis, oni rakontadis, oni kantis la himnon, oni svingis salutojn al pasantaj vagonaroj. Kia bela paca revenĝo je la ŝiraj forveturoj de soldatoj dum la milito! Interfratiĝo redonis al koroj esperon kaj ĝojon. Venos pli bonaj tempoj. "Iam la homoj ĉesos esti lupoj unu kontraŭ aliaj", profetis Zamenhof.

En ĉiuj gazetoj de Centro-Eŭropo aperis artikoloj mirantaj pri la granda nombro da esperantistoj. La impreso estis vere forta kaj neatendita. Esperanto retrovis vivantan popolon. Dum la tuta kongreso regis neordinara entuziasmo kaj optimismo. Oni ja sentis ke la tuta movado efektive revekiĝis kaj reprenis sian marŝadon antaŭe. La nova postmilita periodo brile malfermiĝis.

[x]) Laŭ statistiko en "La Progreso", ĉeĥoslovaka organo esperantista, n-ro 8/1921. pĝ. 67, estis 2561 aliĝintoj, el kiuj preskaŭ 400 ne petis persone siajn kongresdokumentojn, laŭ kio oni devas juĝi, ke efektive partoprenis 2200 ne kalkulante multajn familianojn sen kartoj. 1406 aliĝintoj estis el ĈSR, 1155 ekster ĈSR.

Notinde estas ankaŭ, ke la kongreso havis sian specialan kongresan marŝkanton: "Nur antaŭen!" Komponis ĝin Josef Horák(/regimenta muzikestro en Plzeň) laŭ teksto de D-ro Stan. Schulhof.

La XIII-a okazis sur la Slava insulo. Ĝenerala sekretario estis d-ro A. Pitlík, membro de la sekretariaro estis i. a. Julie Šupichová.

J.M.

70 jaroj de la Esperantista Klubo en Brno
==================================

La 12 – 13-an de junio la Esperantista Klubo en Brno aranĝos solenaĵojn okaze de la jubileo de 70-jara ekzistado de la klubo, kiu estas la plej malnova en ĈSSR. En la kadro de la festo estas preparata Konferenco pri la historio de la E-movado sur la teritorio de ĈSSR (sabaton posttagm. kaj dimanĉon antaŭtagm.), kun referaĵoj pri historiaj etapoj en la evoluo de la movado. La materialoj estas eldonotaj kaj ili enhavos ankaŭ manuskripton pri la movad-historio el la plumo de D-ro Stan. Kamarýt, ĝis nun publike nekonatan.

Sabaton vespere okazos amuz- kaj danc-programo.

La Esperantista Klubo en Brno okaze de sia jubileo estu ĝoje kaj gaje salutata de sia pli juna (je unu jaro nur!) kunfrato, la Esperantista Klubo en Praha!

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

BULTENO de Esperantista Klubo en Praha-loka grupo de Ĉeĥa E-Asocio, trimonata organo de la Klubo – redakta komitato: ing. Eduard Felix, Oldřich Kníchal, Jaroslav Mařík.
Adreso; Esperantista Klubo en Praha – loka grupo de ĈEA poŝtkesto 1059, Praha 1, Ĉeĥoslovakio.